


# STARTG ★ E

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO 1975 4/50/



**SIMBOLO  
DE INTERNACIA  
KUNLABORO**

## LA KONFERENCO KAJ NI

En la Ferma ĝkto de la konferenco pri la europa sekureco kaj kunlaboro en Helsinko oni povas trovi jenan alineon:

La ŝtatoj-partoprenantoj esprimis sian deziron subtenadi studadon de fremdaj lingvoj kaj kulturoj kiel grava rimedo por vastigo de la kontaktoj inter la nacioj, por pli bone konatigi ĉiulandajn kulturojn unu al la alia ...

Estus dezirinde, ke ĉiuj esperantistoj konatigu speciale kun tiu ĉi parto de la dokumento por povi apliki ĝin kiel gravan argumenton en sia peresperanta agado.

Okaze de la konferenco en Helsinko ĉeĥa sekcio de MEM sendis al Ĉs. Packomitato proklamon, en kiu ĝi bonvenigas tiun ĉi eventon, plene adekvatan al la paco-aspiroj de la popoloj. (k)

## TRANS LA LINGVAN BARON

Tiu ĉi titolo enkondukas artikolon en la ĉeĥa ĵurnalo "Mladá fronta" (19.7.). Unu el la konstatoj pli malsupre: El la tuta trejnado de la kosmonaŭtoj por la eksperimento Sojuz-Apollo la plej malfacila estis la lingvolernado. La avantaĝo estis ĉe la sovetiaj, ĉar ili jam antaŭe studis la anglan. Tamen ĉiusemajne kun la ceteraj stabanoj en Bajkonur ili dediĉis al tiu ĉi tasko dudek horojn. Des pli peniga afero por la usonanoj. Eĉ la plej perfekta scipopovo de la fremda lingvo ne estas ĉio - komentis la lernadon T. Stafford. Estas necese koni la manieron de inform-interŝanĝo inter la kosmonaŭtoj kaj inter ilia spaco-ŝipo kaj la Tero.

E. Cernan, la lasta homo, kiu ekstaris sur la luna surfaco, vicedirektoro de la usona parto de la projekto, (i. a. nepo de slovakaj elmigrintoj al Usono), plendis al la raportisto de "Novosti": Por mi estis multoble pli facile surluniĝi ol ekregi la fundamentojn de la rusa.

Oni povus nun demandi: ĉu la homaro sukcesos venki la lingvan baron sur la Tero same kie ĝi venkis la graviton en la kosmo? (k)

## ALVOKO al unueco de UEA

La Centra Komitato de Bulgara Esperanto-Asocio en sia proklamo responde al la letero de prof. I. Lapenna, publikigita en Israela Esperantisto, apelacias al unueco de UEA surbaze de ĝia Statuto kaj klarigas la kaŭzojn, kiuj igis la eksprezidanton de UEA ataki kontraŭ tiun ĉi landan asocion.

Prof. Lapenna kulpigis BEA en la menciita letero pro "senbridaĵaj atakoj" kontraŭ Israelon kaj kontraŭ la neutralecon de UEA, kiuj - laŭ li - aperis en "iu nova oficiala programo" de la Asocio. Tamen la dokumento, kiun prof. Lapenna klopodas interpreti kiel "novan programon", estas nenio alia ol kutima jarraporto de BEA el 1972 kaj koncerne Israelon kaj ties Esperanto-asocion ĝi prezentas nenian novan starpunkton. La aŭtoro nur klopodas mistifiki la neinformitajn esperantistojn, ŝajnigante, kvazaŭ la starpunkto de BEA - cetero konforma al la Rezolucio de UNO pri malaprobo de la agresa politiko de la israelaj ekstremistoj - ne estus al ĉiuj landaj asocioj jam delonge konata.

Ke prof. Lapenna mem atencas ne nur per siaj vortoj kontraŭ la unuecon de UEA, pravas la ĵus okazinta en FRG "kongreso de la neutrala Esperanto-movado", kie li prezentis la enkondukan prelegon. Tia ĉi arango apenaŭ povas kontribui al plifortigo de la tutmonda organizaĵo. Per pseudo-neutralismaj asertoj la opoziciuloj kaŝas nun sian indignon kontraŭ la nuntempa estraro de UEA. Pri iliaj atakoj ekz. kontraŭ Ĉeĥan Esperanto-Asocion oni povis legi en la menciita Israela Esperantisto kaj en la hispana Boletín. Urso servo al la neutraleco de UEA. (k)

## Kiom oni legis pri ESPERANTO

En la ĉeflingva gazetaro aperis (laŭ la registra servo de ĈEA) 132 artikoloj kaj informoj pri Esperanto en 1973, sed jam 196 en la jaro 1974. Ĉu la resumo por 1975 superos la atingitan ciferon?

## DIPLOMATOJ EL 20 LANDOJ ĈE LA 60a

Dimanĉon, la 27an de julio 1975 estis malfermita la 60a Universala Kongreso de Esperanto. En la salono Zamenhof, en la kongresejo Falkoner Centret, Kopenhago, kolektiĝis ĉ. 100 kongresanoj el pli ol 40 landoj.

La prezidanto de UEA dro H. Tonkin memprigis en sia parolado, ke la 60a UK estas jubilea en tiu senco, ke antaŭ 70 jaroj "la pioniroj de la lingvo" unufoje kongresis en la franca urbo Boulogne-sur-Mer. La LKK-prezidanto G. Kuhlman esprimis sian kontenton pri tio, ke malgraŭ multaj obstakloj li fine povas bonvenigi la kongresanojn en Kopenhago.

En la nomo de la dana kulturministro salutis - provante paroli en Esperanto - la departamenta ĉefo O'Perch. Lin sekvis Ch. L. Jensen, la vicurbestro de Frederiksberg, komunumo, en kiu okazis la Kongreso. Simpatian paroladon faĝis unu el la urbestroj de Kopenhago, A. Andersen.

Poste H. Tonkin atentigis pri la mesaĝo al la Kongreso de la ĝenerala direktoro de UNESKO, Amadou Mahtar M'Bow, presita en la Kongresa libro. Li prezentis reprezentanton de la dana nacia komisiono de UNESKO, la rektoron de ISU, la prezidanton de Dapa Esperanto-Asocio kaj la direktoron de CO de UEA. Post la muzika paŭzo sekvis la parolado de F. Szabo, estrarano de UEA, dediĉita al la Internacia Jaro de Virino.

Impona estis nombro de ŝtataj reprezentantoj. Krom Danlando 19 ŝtatoj sendis siajn diplomatojn al la inaŭguro. Ĉeestis au salutis tiuj el Aŭstrio, Belgio, Bulgario/ambasadoro invitis en Esperanto al la UK en Varna, 1978/, Finnlando, Grekio, Hinda Unio, Hungario, Islando, Italio, Japanio, Kanado, Malto, Monako, Nederlando, Norvegio, Pollando, Tajlando kaj Usono. Krome ĉeestis reprezentanto de Tutmonda Federacio de Sciencistoj kaj estrarano de Mondfederalista Asocio. La kongreson salutis 28 infanoj el 8 landoj.


La prezidanto de UEA fermis la inaŭguron i. a. per jenaj vortoj: "En la hodiaŭaj tagoj ni legas pri tiu miraklo de modernaj scienco kaj teknologio. Kaj kiel tiuj ĉi reprezentantoj de nia moderna socio komunikigas? Per du lingvoj, pene akiritaj... UEA estas organizaĵo neutrala, kiam temas pri politiko kaj ĝi ĵaluze gardas tiun ĉi neutralecon. Sed ni havas nian firman pozicion en demandoj, kiuj rilatas al lingvoj. Ni estas por la utiligo de la Internacia Lingvo Esperanto en ĉiuj internaciaj rilatoj..."

La malfermon de la Kongreso prezidis d-ro W. Bormann, la vicprezidanto de UEA. Post liaj enkondukaĵaj vortoj d-ro V. Sadler prezentis reprezentantojn de la landaj asocioj. Por Ĉeĥa Esperanto-Asocio ĉeestis sekretario Z. Křimský kaj vicprezidanto D. Kočvara.

Post la salutoj sekvis la malferma parolado de la prezidanto de UEA. La parolanto alvokis i. a. por kunhelpo en la nova Volontula Servo de UEA, li pritraktis la staton kaj perspektivojn de la laboro sur la informa kaj internacia kampoj, akcentis gravecon de la fakaj asocioj kaj pledis, ke la argumentoj de la esperantistoj estu bazitaj sur science pruvitaj faktoj. Al la zamenhofa idealo li deziris "prosperon, progreson kaj finan sukceson".

El Kopenhago raportis Z. Křimský

KONATA SIMBOLO DE LA DANA ĈEFURBO





## VIRINOJ EN ĈEĤA ESPERANTO-MOVADO

de JAROSLAV MAŘÍK

/Daŭrigo/

M a t y k o v á Zdenka, prez. de EK Hradec Král., membrino de Lingva komisiono de ĈEA. En 1975 sur la 1-a loko inter ĉs. korespondantoj de Radio Varsovio.

M i l a t o v á Anna (1910), aktiva sur organiza kampo en Třinec, ĉeestis multajn UK.

M o u d r á - H e ř m a n s k á Marie aktive laboris en la Rondeto de esperantistinoj en Praha.

N o v á k o v á Hedva, nia "onklino". En EKP de 1922, longjara aktivulino, kasistino de EAČSR. Ŝia edzo estis la fama ekskurs-organizanto por esperantistoj en Praha.

N ý v l t o v á Arnoštka (1897), siatempe vigla klubanino en Praha, impres prezentis sur scenejo kelkajn rolojn en la "Verda Ĉaro de J. Baghy" (flegistino en "Nora", vartistino en "Legendo pri amo", s-ino Hill en "Pigmaliono").

N ý y l t o v á - R i h á ĉ k o v á Eva (1931) (filino de la antaŭa), komitatanino de EAČSR kaj gvidantino de ĝia junulara komisiono (1951), kursgvidantino por infanoj. Sukcesa aktorino en la "Verda Ĉaro de J. B." (s-ino Higgins en "Pigmaliono", s-ino Lind en "Nora", Ĥirin en "Legendo pri la amo", Strouhalka en "Maryša" k.a.).

P l a m í n k o v á Františka, senatanino, ekzekutita de hitleristoj. Ellernis kaj favoris Esperanton, ebligis al Supichová publikigi en diversaj gazetoj.

R y b á ĉ k o v á Jarmila, gvidis EK en Pardubice, komitatanino de ĈEA, kunorganizas la renkontiĝojn sur la monto Kunětická hora.

R e h á ĉ k o v á Božena, iam vigla klubanino en Praha, membro de la kontrolo komisiono de EAČSR. Nur la sanostato forigis ŝin.

S i t t a u e r o v á Olga, kursgvidantino, junulara delegitino, librotenistino de SET Lančov, efika helpantino de sia oferema edzo en SET-laboroj.

S k a ř u p o v á Marie, administrantino de la famaj Someraĵ kur-saroj en Rožnov pod Radh.

S k l e n ĉ k o v á Božena (1897), esperantistino de 1919, kunla-boris en Teritoria oficejo de UEA por ĈSR en Hradec Králové, gvi-data de ŝia edzo Oto (librotenado, administrado de membroj de UEA kaj ĈEA). UEA-anoj en ĈSR en tiu tempo lauproporcie superis ĉiujn landojn. - La konata aktoro Ota Sklenčka, ŝia filo, estas nia membro.

S u c h a r d o v á - S e e m a n n o v á Eva (1920), esperantistino de 1949, kursgvidantino, kun poemfara talento (Leteral malprok-simo, Konfeso, Al L. de Camoens, premiita ĉe la 36a UK, Nadaĵo (pre-miita en "Konkurso Ariel"), sed antaŭ ĉio aktorino kaj deklamantino. Elstaris en la sursceneja arto. Sign artisman kolektivon ĉe la E. Klubo en Praha (1954-59) ŝi nomis lau ideo de sia poeta amiko "Verda Ĉaro de Julio Baghy". Por ĝi ŝi lertg esperantigis plurajn teatra-ĵojn. Post multaj programoj miksitaj au monologaj ("La homa voĉo" de Cocteau) ŝi kreis elstarajn figurojn de la teatra arto (Inez en "Ko-respondu" de sia edzo Ant. Seemann, ricevinta la I-an premion en EK 1954, Klara Zamenhof en "Mi esperas" de Seemann - en kiu, niascie, je la unua fojo estis surscenigita la figuro de L. L. Zamenhof - , Nora en "Nora" de Ibsen, la reĝino en "Legendo pri amo" de Hikmet - tiun prezentadon ĉeestis la aŭtoro - , Maryša en la samnoma teatraĵo de fratoj Mrštík. Kredoble, la kulminon ŝi atingis kiel "patrino" en "La patrino" de K. Čapek kaj kiel Eliz en "Pigmaliono" de J. B. Shaw,

per kiu lasta ŝi kaj la V. Ĉ. triumfis ĉe la UK 1959 en Varsovio. (Pri la V. Ĉ. vidu artikolon en la "Panoramo", 1-2/1974.)

S t r e j ĉ k o v á - Š a m l o v á Marie (1891-1970), esp.de 1927, vicprezid. de EK Brno, aktiva precipe en Radio Brno (ofte parolis en E.-programoj), gvidis paraktoran E.-kurson, el kiu fondiĝis TRAKT de la "Verda Stacio" - artismaj E.-elsendoj, kun membroj K. Höger, V. Leraus, V. Svabíková-Kožíková, reĝisoro Bezdíček, D. Chalupa k. a.

S t u d n í ĉ k o v á Božena (1849-1934), instruistino kaj direkto-rino, rekonita porinfana verkistino, prezidantino de První dámský spolek esperantský (Unua Virina Grupo Esperantista) ĉe la Náprstek-Muzeo en Praha, en kiun transformiĝis en 1904 la virina sekcio de UK en Praha, inter kies fondintoj estis Josefa Náprstková. - La unua inter ĉeĥoj, kiu verkis originalajn poemojn en E. (unu melodiigita de prof. V. Scheiber eldoniĝis kun poemoj de Pič kaj Baghy sur gramofona disko). Ŝi verkis ankaŭ originalan dramon (La konkurantinoj) k. a. "Fervora, progresema kaj entuziasma samideanino".

S k o d o v á Milena (1925), instr. en Praha. Dum la 44a UK en Varsovio elektita kiel unua ĉs. membrino de la tie fondita Interna-cia Esperantista Virina Komitato (INEVKOM) kaj poste ŝi fondis-virinan fakon ĉe ĈSEK. Delegitino ĉe la I-a Konferenco de INEKKOM en Bu-dapesto. Gvidis en Praha lernejan E.-rondeton, kiu prezentis sin ĉarme en EK dum Int. virina tago.

S u m a v a n s k á Stěpánka. Estu menciata ankaŭ laboro de neniu vidata, por multaj teda, sed ankaŭ necesa por la movado. Ŝi faris tre multe da laboro por EK Praha (dum Sustr): sliparoj, kartotekoj.

S u p i c h o v á Julie (por eksterlandanoj: legu ŝupíňovaa), 1884-1970. Faka instruistino, ĉeĥa kaj Esperanta verkistino, membrino de la Ekzamena komisiono de SCE de 1915, membrino de Lingva Komitato (de 1925); de Kuratoraro de IEM Vieno, honora membrino de UEA (1933), EAČSR, ĈEA, de EK Praha, ES Komenský Ostrava-Zábřeh k.a., delegitino de UEA de 1910, pioniro de Esperanto, multopa funkciulino kaj grup-fondantino. Sukcesa edukistino, batalantino por paco, modesta, nobla virino.

Esperantistino de 1907, fondis kelkajn esp. rondojn (Ĉ. Kostelec, Praha), aŭtorino de sennombraj propagandaj artikoloj kaj informoj, de lernolibroj (aperis eĉ en la brajla skribo) kaj konveraciaj libroj (aperis ankaŭ en Pollando kaj Jugoslavio), de legolibro. Sen-nombrajn kursojn ŝi gvidis, la plej konatan en "Malý čtenář", kiu de-vigis ŝin labori ĉiutage ĝis la 2a horo matena, sen iu ajn rekomp-en-co (eĉ tiun gazeton ŝi mem devis aĉeti). Ŝi uzis ofte pseudonimon (Studnická, Dubická, U-I, Ejš, Ješa, Š-á k.a.) en diversaj artikoloj kaj eseoj, precipe kiuj ne rilatis al IL. El ŝiaj ĉeĥlingvaj verkoj la plej elstaraj estas "Esperanto, jeho vývoj a význam pro národní školu" kaj "Kdo je Zamenhoff".

Por reliefigi ŝian vivoverkon eĉ memstara ĉapitro ne sufiĉas - ŝi ampleksus tutan monografion. Ekzistas multaj interesaj detaloj el-lasendaj en resumo. Esperantistino ekster serio, kiu fosis la plej longan sulkon en la ĉeĥa E.-movado, virino kun aktiveco eksternorma-la kaj sindediĉo absoluta. La nomo apostolo decas al tiaj ekster-grdinaruloj.

S v a b í k o v á - K o ž í k o v á Zdena (edzino de D-ro F. Kožík, ankaŭ iama membro de Verda stacio, fama verkisto), membrino de la estinta TRAKT ĉe Radio Brno, rolis en diversaj E.-artismaj programoj en Radio Brno kaj en Praha (Verda Stacio). - Sed oni ne povas nomi ŝin "esperantistino".

T a r a n t í k o v á A. (1899) aktiva komitatanino de ĈAE kaj de EK Praha, inter la du mondmilitoj, verkis en propagandaj gazetoj, multe vojaĝis. Esperantistino de 1923.

T e s a ř o v á Ludmila, direktorino kaj verkistino, helpadis al K. E. Macan organizi porblindulajn E.-kursojn en la Deyl-Instituto

(Praha) kaj laboris en la Unua sinjorina grupo Esperanta (První dámský spolek esperantský). U r o a n o v á Eli (1922), instruistino, la plej fruktodona ĉeĥa Esperanto-poetino. Ŝi verkas originalajn poemojn de forta esprimivo (foje ankaŭ sub la nomo E. Doubravová-Urbánová), kelkfoje premiitajn ĉe la Belartaj Konkursoj (ekz. la 1-a ĝis 3-a premioj en Haarlem, 1954). En "Staĉeto" (La Laguna) aperis ŝia poemaro "Nur tri kolorojn", konsistanta en la versokikloj: Pri mi mem, Tra la urbejo, Gutoj de intimo, Jarsezonoj, Besta parado, Fantaziaj scenoj, Fataj renkontoj kaj fabeloj, El la korbo, Du maristoj, Okazaj poemoj, Hetaĵoj dancas, Herooj de la Zodiako, Triopo. - Sigismundo Prágano karakterizis ŝin en 1954 kiel "grandan promeson". En la lastaj jaroj ŝi dediĉas sian tutan liberan tempon al vigla kaj kompetenta gvidado de ER kaj de Klubo de internacia amikeco en la lernejo ZDS en Lindnerova str., Praha 8. Ŝian laboron tie aprezis ankaŭ la Ĉs. Radio kaj Televido.

V l ĉ k o v á - M e t z n e r o v á Božena (1887) en Kladno kaj Teplice-L., nun 88-jara, esperantistino de 1919, karakterizata de laboremo, persistemo kaj modesteco. Helpis al K. E. Macan gvidi E.-kursojn en la blindula Klár-Instituto (1922-25), kiuj havis vastan resonon. Ŝi gvidis komisionon de EAĈSR por tradukaĵoj en manuskriptoj, tradukis la verkon "Urbo sub signo de fajro" de M. Majerová. Kunlaboras al la lingva komisiono de ĈEA. V o n d r o u š k o v á Milada (1913-1972), LKK-anino en tri landaj E.-kongresoj en Brno. Eminentulo sukcesis en asocia ekzameno. Menciindan ankaŭ en la rubriko "Esperantist-edzinoj".

V o z á b o v á Eliška Mudr. (1874), unu el la unuaj kuracistinoj en nia lando, fine de la 50-aj jaroj la plej maljuna ĉs. esperantistino (laŭ konstato de J. Supichová), posedantino de la Ordeno de Laboro. Informis pri E. siajn pacientojn.

W e l t e r o v á Františka. Pri ŝi validas la samo kiel pri Šumavanská (vidu tie). Ŝi dum jaroj tajpadis la multnombrajn korespondantojn de la klubestro Sustr en Praha kaj ankaŭ nun ŝi daŭrigas. Z d v i h a l o v á Draha, junulara aktivilino fine de la 60aj kaj komence de la 70aj jaroj, estraranino de ĈEA (1969-72).

Z e d n í k o v á S., autorino de la dramo "Benkonto" (ĉeĥa-esp.) Z e d n í k o v á Sona (1928) (alia ol la antaŭe menciita) fondis kaj gvidis ER en Modřany, kies membrino estis ankaŭ s-ino Vojtová, edzino de Jar. Vojta, Nacia Artisto. Ŝi redaktas la esp. parton de la bulteno "Demosta", kvaronjara eldonaĵo de la Federacia Statistika Oficejo. Autorino de la E.-parto de seslingva "Demografia vortaro" (1974).

#### Komitataninoj de la landa asocio

estis ankaŭ: Fryšová Anna (EAĈSR), R. Herzigová (ĈAE, post la I-a mondmilito), Kubová Marie, Olomouc - EAĈSR - vickomitatanino. - En la ĈK de ĈEA nun kunsidas ankaŭ Věra Podhradská el Brno kaj Nada Jirečková-Zedníčková el Lanškroun (estis aktivaj en la Junularo dum la 50aj jaroj).

Nia temo ne tuŝas la virinojn en la slovakia parto de ĈSSR. Sed ni menciis tiujn virinojn, kiuj kiel komitataninoj de EAĈSR kundecidis ankaŭ en la ĉeĥa movado:

Ozábaldová Alžběta kaj Seppová-Šaturová Magda, el kiuj la lasta estis ankaŭ "Delegitino" de la Ĉs. E.-Junularo por Bratislava kaj kursestrino en SKE en Doksy.

#### Majstrinoj de Esperanta elokventeco

Apartan alineon mi ŝatas dediĉi al la virinoj, kies elokventeco en la Internacia lingvo estis surpriza, ja eĉ fascina! Ekzistas mul-

taj virinoj, kiuj eĉ la gepatran lingvon ne regas tiel, kiel tiuj ĉi la IL. Ili apartenas inter la fenomenojn en la IL, por kiuj iu sialtempe ekuzis la burleskan karakterizilon "automobilrapidparolanto". Mi mem havis la plezuron koni jenajn: M. Adámková (Ostrava, Praha, Karl. Vary), Kamila Lampířová, nun PhDr. Bárťková (Třebíč, Okříšky), Lidmila Rejthárková (Hradec Králové) kaj Iva Smidrkalová-Åberg. - Kiam mi en 1947 renkontis K. Lampířová sur la Václav-placo, aro da studentoj de la monda festivalo ĉirkaŭis nin kun intereso provante diveni niajn naciecojn. Rejthárková (esp. de 1945) krome ankaŭ rolis en la Verda Ĉaro de J. Baghy kaj estis premiitino de la Floraj Ludoj ĉe SKE Doksy (1951). La junulino Iva S. fascinis nin en EK Praha. Iu plendis ne kompreni ĉion de ŝi, sed la kaŭzo estis, ke la plendanto simple ne estas kutima al la "automobilrapidparolanteco"!

#### Ĉeĥinoj en alilando

Junck Rosa, ĉeĥino el Tábor, edziniĝinta al italo. Ŝia prononco de E. inspiris doktoron Zamenhof doni, dum la I-a UK, ŝian prononcmanneron (ĉeĥa-italan, t. e. kun malfermitaj vokaloj), kiel modelon por la aliaj nacioj. De tiam la regulo estis klara por ĉiuj. - Ŝi havas meritojn en disvolvado de E. en Italio; italigis la Fundamenton de E. kaj aliajn.

Čiškovecká-Paulhaber Evža, instruistino en Praha, edziniĝis el eminente nederlanda esperantisto, Akademiano. Ŝi redaktis en Amsterdamo la porinfanan gazeton "Nia vojo".

x x x x

#### La edzinoj

Kaj la skizo ne estus komplete, se mi ne rememorus tiujn, kiuj per siaj pacieneco, toleremo kaj iam eĉ helpemo ebligis dum longaj jaroj al siaj edzoj dediĉi sin al la funkcioj kaj elstari en la Movado - la esperantist-edzinojn (el kiuj tamen iuj mem estis esperantistinoj kaj eĉ aktivulinoj en la lokaj movadoj): Marie Baldová, Ynke Bartošíková, Dobromila Čejková, Tonička Echtenrová (sialtempe aktiva en Praha), s-ino Francová, A. Hromádová, M. Ginzová (laboris en la junularo en la 20aj jaroj), Libuše Izáková (ja laudevene praganino - lernis en SKE Doksy), Zdenka Kamarytiová, Ema Kilianová, Hilda Kořínková, Růžena Krámská, Božena Pumprová, Marie Pytlounová, Olga Sittauerová, s-ino Slavíková en Praha, Anežka Sustrálová (1900, faris utilajn servojn al EK Praha), Aloisie Vítková (krome edukis aktivajn esperantistojn en siaj du filoj), Milada Vondroušková ... kaj certe ankoraŭ aliaj. La "aliaj" pardonu al mi - mankas fontoj pri ili!

x x x x

#### K o r e k t o

La presista koboldo sen mia scio ŝanĝis, en la I-a parto, la titolon de mia laboraĵo: la korekta titolo devas esti: "Virinoj en la ĉeĥa Esperanto-movado" (ne: "ĉs"), kiel cetere evidentiĝas el la rubriko "Komitataninoj", kaj ĝusta subtitolo estas "Internacia Jaro de la Virino".

#### K o m p l e t i ĝ o j

Bonvolu kompletigi ĉe la nomoj: Adamcová M. (1893), esp. de 1926, komitatanino de EK Brno dum jardekoj, ĝia honora membrino; ege sukcesa reĝisorino de teatraj vesperoj de EKB, ankaŭ aktorino. -- Boháčová V.: nask. 1906, esp. de 1934, sekretariino de la Virina komisiono de ĈSEK. -- Borská V.: mortis

1962. Ankaŭ programaktiva en EK Brno. -- Čichová J.: vicprezidentino de la Virina komisiono de MEM. -- Jakubcová M.: autorino de la poemaroj "Elektitaj versaĵoj". Honora membrino de EK Brno. -- Josková M.: nask. 1913, sekretario de EK Praha. -- Konopová A., nask. 1897, sekr. de la Virina komisiono de ČSEK. -- Lorková M., komitatano de EK Brno, kungravaj funkcioj en la "Teatraj vesperoj de EKB", aktiva siatempe ankaŭ en la Junularo

x x x

Menciinda estas ankaŭ la laboro de s-inoj Růžena Hrušková kaj Anna Čermáková, dum jaroj kuiristinoj (sensalajraj!) en SET Lančov. Pro tralego de la tekstoj kaj ev. kompletigoj mi dankas al gesanoj: Čichová, Hejnová, Metznerová, Vitek, Vondroušek, pro nomkompletigo al s. Novobilský, Sittauer kaj Sklenčková. - La aŭtoro.

## Tagoj de Ĉeĥoslovakio en Riga

Lige kun liberigo de Ĉeĥoslovakio fare de Soveta Armeo okazis en Riga diversaj aranĝoj dediĉitaj al ĈSSR.

La 20an de majo enkondukis ilin la tago pri ekonomiko kaj tekniko. Dum pli ol unu semajno oni povis rigardi interesan ekspozicion "Produktita en ĈSSR" kiu prezentis diversajn aparatojn, maŝinojn fabrikatajn en ĈSSR. Sekvis la kulturtemaj tagoj: en la riga librovendejo "Globus" estis aranĝita ekspozicio de libroj eldonitaj en Ĉeĥoslovakio (mankis nur Esperanto-eldonaĵoj), kiu vekis tre grandan interesiĝon inter la urbanoj. Dum la unua tago la enspezoj de la magazeno atingis 3000 rublojn.

La riganoj havis eblecon denove aŭskulti la majestran orgenludon de Milan Šlechta, kiu dufoje koncertis en la Katedralo, vidi la kant - kaj danc-ensemblon "Lúčnica", spekti la teatraĵon de la pantomima teatro "Na Zábřehu" el Praha, aŭskulti la kamer-orkestron el Slovakio kaj partopreni aliajn aranĝojn. Kiel konate en Latvio oni prezentas multajn teatraĵojn de ĉs. aŭtoroj. La plej populara spektaklo estas "Švejk", kiun nun surscenigis ankaŭ la Pupteatro de Riga.

La tagoj dediĉitaj al ĈSSR konatigis nin kun parto de diversaj atingoj de ĉeĥaj kaj slovakaĵoj amikoj. Ni esperu je plua kunlaboro inter niaj landoj.

M. Burgmeister, Riga

SET 1975

Ambaŭ etapojn de la nunjara Somera Esperanto-Tendaro en Lančov (13.7. - 9.8.) partoprenis 218 personoj, el kiuj estis 15 eksterlandanoj (ep la 1-a) kaj 41 (en la 2-a etapo) - el Hungario, GDR, Pollando, Aŭstrio kaj Kanado. Kiel tendarestroj funkciis P. Sittauer kaj P. Sedláček. Kiel ĉefinstruistoj funkciis Z. Hráel kaj K. Franc.

## UNIVERSALA LINGVO DE ESTONTO

La problemoj de universala lingvo altiras ĉiam pli atenton de la sovetaj sciencistoj, diris en sia parolado Pri bazaj metodologiaj problemoj de interlingvistiko<sup>(1)</sup> en Mělník, aprilon 1975, d-ro M. J. Isaev, doktoro de filologiaj sciencoj, gvidanto de Interlingvistika Grupo ĉe Lingvosciencia Instituto de Akademio de Sciencoj de USSR.

Iuj sciencistoj asertas, ke la estonta homara lingvo iĝos unu el la naciaj lingvoj, aliaj supozas, ke tia lingvo povas esti nur artefarita. La konata lingvosciencisto A. A. Reformatskiĵ diras, ke la IL povas formiĝi nur surbaze de la naciaj lingvoj, kio estas ligita kun la eveluo de novtipaj nacioj. Prof. V. G. Kostamarov aldonas, ke povas okazi, ke iam oni kreas tre perfektan artefaritan lingvon kaj sen bedaŭro rezignos pri naturaj lingvoj. Kelkaj sciencistoj koncedas, la ĝblecon solvi la problemon de IL kiel pere de la naturaj tiel ankaŭ pere de la artefarita lingvo. Aliflanke certa parto de la sciencistoj ĝenerale konsideras nenecesa okupiĝi pri la problemoj, supozante, ke mankas premisoj por studi ĝin ...

La ĉefa linio sur tiu ĉi vojo, estas klarigi la principan direkton, t. e. malproksiman prognozon, akcentas d-ro Isaev. Tamen necesas studi plej detale ankaŭ la proksiman estonton, ĉar al la internacilingva problemoj viciĝas tiu de la naciaj lingvoj. Kiel ekzemplo povas servi Sovetunio, kie loĝas pli ol 130 popoloj kun siaj propraj lingvoj. La ĉefokupo de lingvosciencistoj kaj kulturaktivuloj post la Oktobra revolucio fariĝis plibonigo de la ekzistantaj alfabetoj kaj la kreo de alfabetoj por senalfabetaj popoloj, ĉar literaturan tradicion havis nur 20 lingvoj. Tiu agado komplikigis pro la treege bunta bildo de la lingvoj apartenantaj al malsamaj ĝenezaj grupoj, kaj diferencaj laŭ siaj strukturoj kaj laŭ la amplekso de siaj sociaj funkcioj. La rezulto de tiu ĉi malfacila laboro estis 50 novaj literaturaj lingvoj.

Nuntempe oni pliperfektigas ilin, plibonigante la alfabeton kaj ortografion, fajnigante la lingvo-normojn, ellaborante necesan terminologion kaj sekante la problemojn konekse kun la lingva kulturo.

Apartan lokon okupas la problemoj de bilingvismo karakteriza por multnacia ŝtato. En USSR la plej grava formo de bilingvismo konsistas en tio, ke ĉiuj popoloj uzas sian nagian lingvon interne kaj por interpopolaj kontaktoj - la rusan. La kazo: rusoj nombras ĉ. 55 elcentoj de la loĝantaro de USSR kaj loĝas en ĉiuj regionoj de la lando. Tamen tiu ĉi interpopola lingvo ne estas deviga kaj jure havas nenian avantaĝon antaŭ ajna nacia lingvo. Ĉiu sovetaj civitano rajtas turni sin al ajna institucio en sia gepatra lingvo aŭ en alia lingvo por li oportuna.

Sekve la ĝuste komprenataj naciaj interesoj ne kontraŭas la ekziston de interpopola lingvo, konstatas M. J. Isaev. La sovetaj popoloj, edukitaj en la spirito de amikeco kaj estimo al aliaj nacioj, optimume uzas ĉiujn eblecojn de la bilingvismo.

Lingvaj problemoj havas siajn specifajn aspektojn en ĉiuj landoj - depende de la socia vivo, agado kaj evoluo. Pro tio nia tasko estas serĉi solvojn en la apliko de diversaj sistemoj de komprenigo. Nia principo devas esti ne "aŭ - aŭ", sed "kaj - kaj". Tio signifas: estu multnombraj naciaj lingvoj; estu la interpopolaj lingvoj; estu la mondaj lingvoj (rusa, angla, franca, hispana, araba, ĉina) kaj estu ankaŭ la internacia helplingvo!

(1) aperis kiel suplemento de la junio n-ro de Budapeŝta Informilo

## RONDETA VIVO

**ĈESKÁ TŘEBOVÁ** - Lo-ka Grupo "Amikeco" festos sian 15-jaran ekziston per solena kunveno la 3an de okt. je la 20a horo en Uzina Klubo de fervojistoj, al kiu estas ĉiuj invitataj. Pli detalaj informoj ĉe Payel Batšk, Leninova 1581, 560 02 Česká Třebová.

Anoĵ de LG ne interrompis sian agadon dum somero. Ili partoprenis la marŝon "25 km tra la montaro Orlické hory". Tenderfajron proksime de Česká Třebová oni okazigis komence de julio; amuzan programon preparis ing. J. Vencel.

**KYJOV** - Al la letervespero de LG ĈEA, la 18an de junio, venis 22 leteroj el USSR, Bulgario, Hungario, Pollando, GDR, Nederlando, Francio, Italio, Hispanio, FRG kaj Aŭstrio. Okaze de la letervespero estis transdonitaj diplomoj al 5 gekursanoj. Post ferioj oni klopodos altiri por la kursoj ĉefe la lernejan junularon.

**OSTRAVA** - Ekspozicion "Esperanto en la servo de la paco", okaze de la liberiga datreveno, vizitis 748 personoj. - Esp. gastoj el Drezdno partoprenis meze de junio la distrikatan spartakiadon, vizitis la Esp. kafejon en Frýdek, la monumenton de T. Čejka en Příbor kaj kelkajn aliajn vidindaĵojn de la regiono. - Kelkaj rondetanoj eksekuris fine de junio al Budapeŝto, kie ili vizitis i. a. la sekretariejon de HEA. - La 15an de junio okazis ĉelima renkontiĝo de polaj kaj ĉeĥaj esperantistoj sur Cantorio. Venis ankaŭ gastoj el Slovakio. La renkontiĝon oni okazigas neoficiale jam 40 jarojn. (dk)

**PLZENĚ** - LG aranĝis la 23an de majo vesperon kun amikoj el Bulgario, FRG kaj Belgio. Vicrondestro ing. Pejřil projekciis lumbildojn pri Bruselo kaj Kopenhago, kiujn komentis s-ro de Bryne el Belgio. La gastoj gvidataj de V. Jířek vizitis banurbojn en

la okcidenta Bohemio kaj la kastelon Loket, poste eksekuris al Praha.

La 12an de julio oni havis 48 gastojn el Budapeŝto, kiujn al la kastelo Kozel apud Starý Plzeň gvidis s-ro Svoboda. (tu)

### JUBILEO de V. ECHTNER

Longjara kaj konata aktivulo de la ĉeĥa Esp. movado, Vuk E c h t n e r, ĝisvivis la 10an de julio sian 70an jaron. Esperantisto ekde 1918, instruisto, eminenta tradukisto kaj lingvekonanto, la iama gvidanto de Lingva Komisiono de ĈEA, kaj precipe meritplena laboranto en la nacia kaj Esperanta blindul-movado, redaktoro de la brajle skribita gazeto Aŭtoro, aperanta sub lia gvido ekde 1929. Dum la lastaj 22 jaroj s-ro Echtner brajligis pli ol 30 lernolibrojn kaj adaptis ilin por blindul-instruado de la sep lingvoj inkl. de Esperanto. Li estis pro sia laboro inter la blinduloj honorigita per la medalo de E. Suchardová, la plej alta rekono en tiu ĉi movado. Al s-ro Echtner estis atribuita ĉi jare Honor-Insigno de MEM kaj ĈEA nomis lin honora membro.

Ni rememoras ankaŭ la sepdek jariĝon de Marie B a l d o v á (2.9.) fidele kunlaborantino de nia karmemora T. Balda, plue de Jaroslav H o š e k (8.7.), la 65 jarojn de Anna M i l a t e v á (7.7.) el Trinec, la 60an naskiĝtagon de Marie T u r k o v á (14.8.) estrino de LG en Plzeň kaj kun malfruigo la 55jariĝon de Eva S e e m a n n o v á (21.3.) el Praha. Laste, sed ne al la lasta ni gratulas la 50jaron Karel F r a n c (6.8.) el Pardubice, longjara kunlaboranto de SET Lančov.

+

En la aĝo de 79 jaroj forpasis en Praha Ružena V i l é m o v á. Honoron al ŝia memoro.

## MEZINÁRODNÍ vědecké sdružení esperantistů

INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA-ISAIE

bylo založeno r. 1906 v Ženevě. Pečuje o rozšiřování mezinárodního jazyka esperanta ve vědeckých kruzích. Z mnoha světově proslulých funkcionářů ISAIE uvedme alespon tři: generála Hyppolita Séberta, francouzského balistika; dr. Josepha Johna Thomsona, britského fyzika, laureáta Nobelovy ceny, objevitele volných elektronů, izotopie aj.; dr. Aimé Cottona, francouzského fyzika.

Nynější předsednictvo I S A E má toto složení:

**předseda:** Dr. E. Popović, profesor matematiky a astronomie na univerzitě v Bělehradě

**místopředsedové:** Dr. C. Stop-Bowitz, prof. zoologie na univerzitě v Oslo  
Ing. V. Peevski, národní vědec, profesor geodézie na technice v Sofii

**generální tajemník:** RNDR Josef Kavka, kandidát technických věd, Lužná 7 - Vokovice, 160 00 Praha 6

**pokladník:** prof. ing. M. Šaponjic, Svetosavská 23a, dvor., 11 000 Beograd

**ostatní členové předsednictva:** Dr. G. Kalchoff, ředitel výpočt.střediska u firmy Siemens v Mnichově  
Dr. S. Kawamura, profesor chemie na univerzitě v Kagawě  
Dr. P. Kustaanheimo, profesor astronomie a matematiky na technice v Lyngby (Dánsko)  
Dr. W. Verlooren van Themaat, předseda sekce pro samočinné počítače v Amsterdamě.

**Terminologické středisko (TERMINOLOGIA CENTRO)** je společnou institucí ISAIE a AE (AKADEMIO DE ESPERANTO). Jeho ředitelem je R. Eichholz, která organizuje esperantský překlad obrázkového slovníku - DUDEK - a vydávání kartotéčního slovníku (SLIPARA VORTARO) s definicemi, ilustracemi a několika jazyčnými překlady odborných termínů. Terminologické středisko má několik departementů pro základní obory.

V mnoha zemích světa má ISAIE svého z e m s k é h o d e l e g á t a . V Československu je jím MUDr. Josef Hradil, 295 01 MNICHOV HRADIŠTĚ 325. V některých zemích existují z e m s k é f i l i á l k y ISAIE. V Československu se právě jedná o to, aby takovou filiálku představovala Technická sekce při Českém esperantském svazu.

**SCIENCA REVUO** je oficiálním periodikem ISAIE. Vychází od r. 1949. Předtím - s válečnými přestávkami - vycházely: INTERNACIA SCIENCA REVUO (od r. 1904) a BULTENO DE ISAIE (od r. 1926). Dnes vychází SCIENCA REVUO v Jugoslávii a to 6x do roka na formátu 17x24 cm. Jednotlivá čísla mají nejméně 32 strany. Lze předplatit prostřednictvím PNS nebo gen. tajemníka.

O d b o r n é s e k c e I S A E pracují jako více či méně samostatné útvary, které vydávají specializovaná periodika, mnohojazyčné slovníky spolu s Terminologickým střediskem, pořádají mezinárodní sympozia a snaží se zavést esperanto jako pracovní jazyk na mezinárodních vědeckých kongresech, spolupracují při organizaci letních esperantských univerzit atp.

Díky činnosti odborných sekcí ISAIE rychle roste množství vědecké literatury v esperantu, které se tak úspěšně zavádí jako pracovní jazyk vědy a techniky. (jk)



## FERVOJISTA SEKCIO

KELKJARA BONA KUTIMO inter la esperantistoj-fervojistoj de Hungario kaj Ĉeĥoslovakio estas la reciprokaj vizitoj.

En julio invitis nin la gekolegoj el Hungario por partopreni Fervojistajn tagojn en Szolnok. Krom la oficialaj reprezentantoj de fervojistaj instancoj partoprenis la solenaĵon ankaŭ reprezentantoj de sindikatoj, anoj de la urba konsilantaro kaj la urbestro mem, gastoj el Pollando, GDR, Austrio kaj Ĉeĥoslovakio.

La urbestro de Szolnok, kiu inauguris la kunvenon, subtekis la signifon de fervojista laboro por evoluigo de la socialismo kaj tiurilate ankaŭ la meritan laboron de la fervojistoj-esperantistoj. Post kelkaj pluaj paroladoj sekvis riĉa kulturprogramo. Dum autobusa ekskurso tra Szolnok ni povis konstati, ke en la 900-jaroj aĝa urbo kreskis la novaj modernaj loĝdomoj, vendejoj, ke estis inaugurita la nova stadiono, unu el la plej modernaj en Eŭropo, simple ke Szolnok fariĝis moderna, belega urbo. Sv. Helmečyová

LA ESTRARO DE FS denove atentigas la sekcianojn kaj pluajn ge-interesitojn, ke la solena konferenco okaze de la 10-jara fondo-dat-treveno de FS estos dum la 4a kaj 5a de oktobro en Ĉeĥá Třebová. Precizajn informojn kaj aliĝojn petu ĉe Frant. Markl, S. K. Neumanna 359, 560 02 Ĉeĥá Třebová.

FERVOJISTOJ ESTAS HOMOJ, KIUJ OFTE VOJAĜAS DEĴORE, sed multaj fervojistoj ŝatas vagadi ankaŭ private. Kaj se oni aldonas al fervojvago Esperanton, la impresoj estas ofte neforgeseblaj. Legu do el la letero de M. Wacniková, nia koleginino, kiu volonte vojaĝas:

En julio Hungara Esperanto-Asocio kaj Hungara Naturamika Ligo aranĝis internacian renkontiĝon de esperantistoj - naturamikoj en Abaliget. Ĝin partoprenis 96 personoj el Hungario, Bulgario, Pollando, GDR, Jugoslavio kaj Ĉeĥoslovakio. En belega naturo, sur la laga bordo, la hungaraj amikoj preparis riĉan naturamikan kaj kulturan programon. Ni vagadis dum kelkaj tagoj tra la montaro Mecsek. Bone organizita naturamika vetkonkuro de 4-anaĝ grupoj (kun diversnacaj anoj) kaj naĝkonkuro havis grandan sukceson. Plue ni vizitas kastelon Siklos, banejon Harkányfurdo, televidan turon super la urbo Pécs. Al interesaj kulturaj programoj mi vicigas fekloran vesperon kun ĉarmaj hungaraj dancoj kaj kantoj, balon honore al la internacia viripa jaro kaj tendarfaĵon kun internacia programo, kie ne mankis ankaŭ niaj, ĉefaj kaj slovakaj kantoj en Esperanto kaj la ĉeĥa.

### SCIENCAJ KOMUNIKAĴOJ \*

estas suplemento de Budapeŝta Informilo, julio 1975, 48 paĝa. En 15 prelegoj kaj 9 artikoloj oni pritraktas diversajn sciencajn kaj teknikajn problemojn. La eldonaĵo estas frukto de la Sciencaj vesperoj en la budapeŝta grupo Konkordo.

LA SEKRETARIO DE TS ĈEA traktas kun Ŝtata Pedagogia Eldonejo en Praha pri eldonebleco de Esperantlingvaj tradukoj de primatematikaj verkoj.

LAŬ LA INVITO de Tutsoveta Societo de amikecaj kaj kulturaj ligoj kun eksterlando gastis fine de junio en USSR la prezidanto de Internacia Scienca Asocio Esperantista, redaktoro de Scienca Revuo, prof. d-ro Boža Popović. Li vizitis Moskvon, Rigon kaj Erevanon.

SKP na vás ještě čekají u nás i ve vašich domovech. Slosování je již 25.10. Nenechte si ujít hodnotné výhry, mezi nimi PIV.

## antaŭ tridek jaroj

Mia edzo estis enkarcerigita en la Dua Mondmilito kiel politika malliberulo. Dum 30 jaroj mi ofte rememorigas al mi la momentojn, kiuj renkontis min dum tri jaroj, kiam li suferis en arestejo.

Unu momento precipe enpremiĝis en mian kapon kaj mi opinias, ke neniam plu ĝi povos esti forgesita. Tio okazis post la atenco kontraŭ Heydrich. Mia edzo jam unu jaron estis en la arestejo de Terezín, kiam antaŭ mia domo haltis poŝtveturilo. Mi ne alkitimiĝis ricevi paketojn, restinte sola kaj forlasita. Sed vidu, la poŝtisto sonorigas, certe, estas mia sonorilo - kaj mi ricevis paketon. Sed kio povus esti interne? Mi kun tremanta mano senigis la paketon de ŝnuro kaj iom post iom dispakis ĝin. Estas momentoj, kiam oni sentas, ke oni ne perceptas sin mem, kiam la sango rigidigas en la vejnojn aŭ ŝajnas, ke oni ŝtoniĝas. Sed kio okazis? Neniu mencio estis en la paketo. Mi lasis ĉion sur la tablo kaj hastis al gestapo. Sed tie neniu sciis pri io. Longe pasis horoj, mi timis la nokton. Mi cerbumis, kiamaniere mi ekscios ion, kiu povos diri al mi la veron. Kaj jen, unu espero. Ni ja havis antaŭ la okupacio amikon, certe li povas ion scii, li estas germano kaj li estas en plena kontakto kun la gestapo -- mi jam longe ne vidis lin - sed tiam li estis nia amiko --

Mi rapidis, kuris tra malluma vespero - li ja ankoraŭ ne dormas, li diros al mi ion, eble li esploros - kaj mi frapis sur lian pordon. Li levis la kapon, kiam mi estis eniranta kaj ŝajnis iom surprizita. Mi ne povis tuj paroli, mia koro forte batis kaj miaj piedoj farigis senmovaj.

"Kio okazis?" li demandis.

"Mi ne scias, sed mi ricevis paketon kun postrestaĵoj de mia edzo, ĉion, kion li havis sur si mem en arestejo, vestaĵon, ĉemizon, ĉapon, unuyorte ĉion, ĉion kaj mi ne scias, kio okazis, diru al mi, mi petas, au esploru, vi povas, vi povas."

Silento.

Li rigardis la paperon, kvazaŭ li estus daŭriganta legadon. Poste li ree levis la kapon kaj diris milde: "Eble oni jam pendumis lin." Kaj li daŭrigis la legadon.

Mi ne sciis, kiamaniere mi alvenis hejmen. Nur poste, kiam mi restis stari ĉe la lito de mia kvarjara fileto, mi rekonsciiĝis. Li dormis senmove kaj trankvile spiris. Li bezonos min, li bezonos min..

La sekvajn tagojn mi malspacience atendis la poŝtiston. Eble li alportos al mi klarigon. Kaj li vere alportis ĝin. En la koverto, kiun li enmuntigis al mi, mi trovis du ruĝajn paperojn kun du paraĝrafoj, lau kiuj mia edzo devos esti transportita al Dresdeno, kie li estos kondamnata.

Du paraĝrafoj. Unu signifis mortpunon, la dua ĝisvivan karceron.

Kaj mi profunde suspiris. Mia edzo vivas, dume vivas...

Zdena Matyková

En la konkurso de Pola Radio gajnis inter la 512 partoprenintoj el 25 landoj la 2an premion Zdena Matyková el Hradec Králové, kiu estas samtempe la tria plej aktiva el ĉiuj auskultantoj kaj kunlaborantoj de la Esp. elsendoj.

ČTENÁŘOM STARTA. Již v prvním letošním čísle jsme upozornili, že Starto bude vycházet šestkrát ročně v rozsahu 16 stran a současně jsme uvedli příčinu této změny. Prosíme proto, abyste ne-reklamovali čísla, která nevyšla a ani vyjít nemohla. Děkujeme!

S. LEACOCK

## *Kiel oni povas pruntepreni alumeton*

Vi eble opinias, ke pruntepreni alumeton sur la strato estas bagatelo. Sed ĉiu, kiu iam provis tion, pruvatestos al vi, ke vi eraras, kaj li tre volonte ĵuros, ke mi priskribas tiun ĉi mian travivaĵon tute konforme al la vero.

Iufoje vespere, antaŭ nelonge, mi staris sur la stratangulo kun cigaro, kiun mi volis ekbruligi. Sed mi ne havis alumetojn. Do, mi atendis, ĝis preteriris min deĉe, normale aspektanta viro kaj mi haltigis lin:

"Pardonu, sinjoro, ĉu vi estos tiel afabla, kaj pruntedonos al mi alumeton?"

"Ĉu alumeton? Ja kompreneble!" Li malbutonumis sian vintromantelon kaj enŝovis la manon en sian veŝt-poŝeton. "Mi certe havas ĉi tie unu alumeton, mi ĵuras, ke tie ĉi en la malsupra poŝeto - ne, atendu, supozeble ĝi estos en la supra - momenton, mi nur demetos tiujn ĉi pakajetojn sur la trotuaron."

"Tamen ne penu", mi klopodis haltigi lin, "ĝi ja ne estas tiom grava."

"Tamen kia peno, tuj mi trovos ĝin, ĝi devas ie ĉi tie esti - aĉaĵeto", kaj li samtempe fervore serĉesploris siajn poŝojn - "sed sciu, mi tiun ĉi veŝton kutime ..."

Mi vidis, ke li ekruĝiĝas. "Ne, vere ne", mi ekprotestis, "se vi tiun ĉi veŝton kutime ... tio ja ne gravas."

"Momenton, momenton!" la kompleza viro ne volis ĉesigi la debaton kaj sian faradon. "Mi ja scias, ke mi havis ĉi tie unu tiun fiaĵon. Mi verŝajne metis ĝin apud la poŝhorloĝo. Ne, ankaŭ ne. Atendu, mi rigardos en la jakon. Se almenaŭ la tajloro farus la poŝojn tie, ĝis kie oni povus manatingi!" Li jam estis tute en ekstazo. Li forĵetis la bastoneton teren kaj serĉfosis en siaj poŝoj kun kunpremitaj dentoj. "Ho, tiu bubaĉo, mia plej juna filaĉo", li siblis, "jen rezulto de tio, ke li senĉese traserĉadas miajn poŝojn! Nu, atendu, ĝis mi revenos hejmen! Rigardu, mi vetas, ke mi havas ĝin malantaŭe en la pantaleno. Levu nur tiel supren la baskojn de mia vintromantelo, ĝis mi ĝin ..."


"Mi petas vin, ne!" mi ekĝemegis. "Ne klopodegu tiom, ĝi ja ne valeras la penon. Pro mi vi ne bezonas demeti vian vintromantelon, ne, mi vere petas vin, ne alĵetu la leterojn kaj ĉion alian en la neĝon kaj ne elŝiru viajn poŝojn! Vi estas treege efabla, sed ne piedpremu vian vintromantelon en la neĝon kaj ne piedbatu viajn pakajetojn! Kaj ne malbenu plu kun tiu kadavrepala aspekto vian knabeton! Mi ĵurpetas vin - ne forŝiru de sur vi tiel furioze vian veston!"

La kompleza viro subite ĝojige ektertoris kaj eltiris la manon el sub disŝirita subŝtofo. "Jen ĝi, la fiaĵeto", li ĝojekris. "Bonvolu servi al vi!" Kaj li altiris ĝin sub la lumon de lanterno.

Ĝi estis dentpikilo. Mi subiĝis al momenta impulso, malsuprenpuŝis la viron sub la radojn de alveturanta tramvagono kaj mi rapide forfuĝis.

J. Pastrňáková, Havířov

PANORAMO, literatura almanako de Starto, alportas en sia 1-a numero de 1975 du fragmentojn el la verko de S. K. Neumann, kaj de P. Jilemnický, glosojn pri la romano, kaj pri verkado kaj tradukado de muzikaj tekstoj en E-o kaj aliajn interesoĵojn. Pri la jubileo de Neumann, tiu ĉi kunfondinto de EK Praha, publikigis artikolojn ankaŭ Esperanto de UEA, Der Esperantist k. a.



NI LEGIS

Tibor Sekelj: PREMIITAJ KAJ ALIAJ NOVELOJ. Eld. Internacia Kultura Servo, Zagreb 1974, 52 paĝoj.

Kvankam T. Sekelj estas konata ĉefe pro siaj altkvalitaj vojaĝ-priskriboj, tradukitaj ankaŭ en iuj naciaj lingvoj, li en sia kolekto de sep noveletoj, sin prezentas kiel majstro de tiu ĉi proza genro. Dum la lastaj jaroj aperis pluraj mallongaj originalaĵoj, sed oni apenaŭ povas kompari iun ekzemple kun la enkonduka rakonto Koni lektanto de ĉielarkoj - pro ĝia humanisma misio kaj alta artnivelo. Lektanto de ĉielarkoj ankaŭ la ceteraj, iuj kun la sciencfikciaj Similan etoson retenas ankaŭ la ceteraj, iuj kun la sciencfikciaj motivoj. Sed la vorto de Sekelj nenigi ĉvebas en la vakuo aŭ en abstraktaj simboloj. Tio validas ankaŭ pri la rimedoj lingva kaj stila. La aŭtoro neniam forgesas, ke li estas principe artisto, ne stilekzcercanto, kaj li scipovas rakonti admirinde, kun kreiva rilato al la realeco. Tiu ĉi kvalito starigas lin sur la unuan lokon inter la nuntempaj Esperanto-prozverkistoj. (kni)

F. SVITÁK 65 jara

korespondi deziras

La 30an de julio festis mian 65-jariĝon unu el la plej elstaraj funkciuloj de nia movado, vicprezidanto de CK ĈEA, vicprez. de Porpaca sekcio de ĈEA kaj Ĉefdelegito de UEA por ĈSSE ing. František Svíták. Esperantista ekde 1932, sekretario de EK en Praha, ekde 1958 sekretario de la unua Ĉs. Esperanto-Komitato, en la jaroj 1965-68 la prezidanto de la dua ĈSEK. Aktive plenumante tiujn ĉi gvidajn postenojn ing. Svíták grandparte meritis pri la renovigo de la memstara esp. organizaĵo en 1969. Dum la lastaj 12 jaroj li estis membro de la redakciaj rondoj de Informoj de ĈSEK, Starto kaj Pace. Kaj verkis la skizon pri la Ĉs. Esperanto - movado inter 1952-1968. En 1973 la prez. de MEM transdonis al F. Svíták Honor-Insignon de MEM.

Portugalia (gejunuloj 11-20-jaraj, ĉiuj el Montigo):

Maria Hortense Marques Baeta, Rua Almirante Candido dos Reis, n.º 76r  
Saul Benito Serra, Rua Antonio Rodrigues Pimentel, n.º 8-1 - Rogério Salvador Marques Baeta, Rua Almirante Candido dos Reis, 76r  
Maria Leoptina dos Santos Dimas, Praca da República, 68 - Paulo Renato Ribeiro Benito, Rua José Joaquim Marques, 107. - Filomena Gonçalves Nunes (instruistino), Av. Infante D. Henrique n.º 24-3  
Er Odete Conceicao Caldeireiro Pereira, R. Dr. César Ventura, n.º 18r  
Ana Paula Valagao Luz Clara, av. Dr. Paulino Gomes. - Ricardo Fernandes Salvador, Rua Gago Coutinho, n.º 87-A. Manuel José Pereira Palma, Av. D. Afonso Henriques, 4-1 E.



SALUTOJ AL SEKRETARIEJO DE ĈEA venis de la sepdek partoprenantoj de SET en Herbortice, kiuj la 15an de julio okazigis ekskurson al la memorindaĵlokoj de la ties rezistbatalo. Salutis nin ankaŭ grupo da LG. membroj en Fišek, rondvojaĝantaĵ tra Pollando.

ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO RICEVIS de la ministerio de kulturo monsubtenon 60 mil kronojn por eldono de Paco kaj klerigo de siaj funkciuloj.

POR INTERESITOJ estas preparitaj trispecaj kovertoj kaj leterpapiroj kun Esp. teksto. Prezo por unu komplekso varias inter 0,40 kaj 0,50 Kĉs, lau la riceco de teksto kaj koloro. Mendu minimume dek !

GLUMARKOJ TRIKOLORAJ kun ĉeĥa aŭ Esp. tekstoj estas konstante haveblaj. Prezo por 24 ekzempleroj (kun Esp. teksto) estas 5 Kĉs au 2 rkp, por 28 ekz. kun la ĉeĥa teksto 6 Kĉs au 2 rkp. Kolektantoj de glumarkoj povas aĉeti ankaŭ tiujn de la 60a UK en Kopenhago (po 2 Kĉs).

#### NIA LIBRO-OFERTO:

|                            |        |    |       |
|----------------------------|--------|----|-------|
| Paŝoj al plena posedo      | 19 Kĉs | aŭ | 7 rkp |
| Perdita vizaĝo             | 15 "   | "  | 5 "   |
| Pri la varmo               | 21 "   | "  | 7 "   |
| Komenio kaj IL             | 4 "    | "  | 2 "   |
| Panoramo - liter. almanako | 8 "    | "  | 3 "   |

Prezoj en rkp inkluzivas poŝtelspezojn.

NE FORGESU PRI LA KRISTNASKAJ FESTOJ. Jam nun ni preparis por vi duspecajn bondezir-kartojn. Rabato 10% kondiĉe, ke vi tuj mendas ilin almenaŭ po 10 pecoj. Prezo por la karto kun koverto (ne rabatita) estas 2 Kĉs. Ambaŭ salutkartoj estas dupagaj kaj arte aranĝitaj.

## Nepre leginda libro!

JOSEF NESVADBA



*La perdita vizaĝo*

E L D O N I S : Český esperantský  
svaz, Jilská 10, Praha

T R A D U K I S : Adolf Staňura

P R E Z O : 15 kb.

El la recenzoj ..... A. de Giorgi  
" La perdita vizaĝo " reliefe elstaras super multaj samspecaj volumoj, dank'al la multfaceta invent-kaj kaj esprim-kapablo de la aŭtoro, kiu nomas J. Nesvadba. Aŭtoro liveras al ni ĉi tie dekon da strece atentokaptaj, sufiĉe ampleksaj kaj kompleksaj rakontoj, kiuj spacas de nure virtuoziŝtaj kaj kontraŭfaŝismaj okazintaĵoj.....

S T A R T O - eldonas Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská 10, 110 00 Praha 1, tel. 220 262. Aperas sesfoje jare. Redaktas Oldřich Kníchal kun red. komitato: dr. Jeromír Jermář, Jaroslav Mařík kaj ing. František Svíták. Tajpis K. Onderová. - Dohl. poŝta Praha 07, sniž.pošt. poplatek pov. RP Praha j.z. P/1 - 2283/1971. Toto číslo bylo předáno tiskárně 10. září 1975.

St 17 -8300/75